- Tion vi ne provu klarigi: aŭ vi faru pli malgrandan ovon, aŭ pli grandan truon !

## Dilemma

A részeg ember egy üveg bor mellett így morfondírozik magában:

- Igyak? Ne igyak? A gyomrom azt mondja, hogy igyak, az eszem meg azt mondja, hogy ne. Az eszem nyilvánvalóan okosabb és mivel mindig az okosabb enged, legjobb lesz, ha iszom.

## Dilemo

La ebrulo cerbumadas en si mem ĉe unu botelo da vino :

- Ĉu mi drinku? Aŭ ne? Mia stomako diras tion, ke mi drinku. Sed mia cerbo tion diras, ke mi ne drinku. Estas evidente, ke mia cerbo estas pli saĝa, ol mia stomako kaj ĉar ĉiam la pli saĝa estas pli cedema, ol la malsaĝa, tial estos pli bone, se mi drinkas.

László Pásztor

Kérjük, fogadják elismeréssel **Király Lajos** úrnak, az eszperantó csoportunk névadójának, az eszperantó érdekében írt második újságcikkét:

## ÁLLOMÁSOK AZ ESZPERANTÓ NYELV LEGÚJABB TÖRTÉNETÉBEN

A világ eszperantistái, velük együtt a magyar és köztük a miskolci eszperantisták is az idén július 14-én ünneplik a nyelv megjelenésének (első tankönyv formájában) 70-ik évfordulóját. A nagyon szerény kezdetből hosszú, göröngyös út vezetett idáig. Dem hiányoztak közben a fényes sikerek, a biztató eredmények sem. Itt most csupán a legutóbbi évek néhány, az eszperantó történetében kiemelkedő eseményről kívánok megemlékezni. Az ENSZ megalakulása után az eszperantista világ aláírási mozgalmat indított a nyelv elismertetése érdekében. Ennek eredményeképpen az Egyetemes Eszperantó Szövetség (Universala Esperanto-Asocio) 1953-ban 16.5 millió aláírással terjesztette elő kérését az ENSZ-ben, amely a kérdés megvizsgálását kulturális szervére, az UNESCO-ra bizta. Ez az 1954. év november és decemberében Montevideóban tartott 8. közgyűlésén tárgyalta az eszperantó ügyét és ennek eredményeként a következő határozatot hozta :

„A közgyűlés megtárgyalván az általános igazgatónak az eszperantó érdekében beterjesztett nemzetközi kérésre vonatkozó jelentését,

1. elismeri a szellemi kapcsolatok révén létrejött nemzetközi cserék terén, valamint a világ népeinek egymáshoz közelebb hozásában az eszperantó által elért eredményeket,
2. elismeri, hogy ezek az eredmények megfelelnek az UNESCO céljainak és elgondolásainak,
3. tudomásul veszi, hogy több tagállam kifejezte az iránti készségét, hogy az eszperantó tanítását bevezesse, vagy kiterjessze saját iskoláiban és felsőfokú nevelési intézményeiben és kéri a közgyűlés a tagállamokat, hogy ezen a téren elért eredményeikről tájékoztassák az általános igazgatót,
4. utasítja az általános igazgatót, hogy kísérelje figyelemmel az eszperantó elterjedésének fejlődését a tudomány, a nevelés és a kultúra területén és e célból működjenek együtt az Egyetemesek Eszperantó Szövetségével a mindkét szervezetet érdeklő kérdésekben.”

Ugyanez a közgyűlés az Eszperantó Szövetséget az UNESCO tanácskozó tagjává választotta és így a szövetség kiküldötte az UNESCO ülésein tanácskozási joggal részt vesz..

E határozat nyomán az egész világon nagy fellendülés indult meg az eszperantó terén. A múlt év elején a Szovjetunió Tudományos Akadémiájának Nyelvtudományi Intézetében foglalkoztak az eszperantó nyelv kérdésével, a múlt év december 27-én pedig a Bolgár Tudományos Akadémia Bolgárnyelvű Intézetének igazgatója, Vladimir Georgiev akadémikus az Akadémia elnökségéhez intézett levelében kifejtette, hogy a bolgár nyelvészek megállapítása szerint jelenleg az eszperantó az egyedüli mesterséges nemzetközi nyelv, amelynek sikerült biztos alapokon nyugvó alapokat elérni. Rámutatott arra is, hogy az eszperantó könnyű nyelv, továbbá, hogy ez a haladó emberiség nyelvének tekinthető.

E nagy jelentőségű megállapítások hatásaképpen ma mind a Szovjetunióban, mind Bulgáriában, de a többi népi demokráciákban is nagyszámú, minden fajú és fokú iskolában az egyetemekig sokezes tömegek tanulják az eszperantó nyelvet, nem is szolva az iskolán kívüli tanfolyamokról. Az egy hónap múlva Moszkvában kezdődő 6. Világifjúsági Találkozó előkészítő bizottsága pedig e találkozók történetében első ízben a találkozó egyik hivatalos nyelvén az eszperantót tette, a legutóbbi, varsói találkozón résztvett eszperantisták egyéni kezdeményezésével elért sikerek hatása alatt.

A magyar eszperantista mozgalom is örvendetes fejlődésnek indult az utolsó két év alatt. A július 13-14-én városunkban tartandó „Északmagyarországi Eszperantó-Találkozó” az ő rendezvényeivel e fejlődésnek és elért sikereinknek bemutatója lesz.

Király Lajos  
„Északmagyarország” című napilap 1957. június 6.-i számából.

Ni petas vin, akceptu rekone la duan artikolon skribitan en intereso de Esperanto, de la nomdoninto s-ro **Ludoviko Király**, de nia Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”:

## OKAZINTAĴOJ EN PLEJ NOVA HISTORIO DE LA ESPERANTO-LINGVO

La esperantistoj de la mondo, kune kun ili la hungaraj kaj inter ili la miŝkolcaj esperantistoj ankaŭ ĉi-jare, la 14-an de julio festas la 70-jaran datrevenon de apero de la lingvo (en ties unua lernolibro.) Longa, malfacila vojo kondukis de la tre modesta komenco ĝis tiam. Sed dume ne mankis sukcesoj, rezultoj. Nun mi deziras nur rememori pri kelkaj gravaj eventoj de la lastaj jaroj. Post formiĝo de AUN (Asocioj de Unuiĝintaj Nacioj) la esperantista mondo

komencis subskriban kampanjon en intereso de rekonigo de la lingvo. Rezulte de tiu la Universala Esperanto-Asocio en 1953 prezentis sian peton kun 16.5 milionoj da subskriboj, kiu la esploron de la peto konfidis al ties kultura organizaĵo, UNESCO. UNESCO traktis la aferon de Esperanto dum sia 8-a Ĝenerala Konferenco en Montevideo en novembro kaj decembro de jaro 1954. Rezulte de tiu ĉi la kunsido akceptis la jenan rezolucion: \*

„ La Ĝenerala Konferenco diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri afero de Esperanto:

1. notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
2. rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESCO,
3. notas, ke pluraj membroŝtatoj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj, aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn membroŝtatojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo.
4. komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo kaj tiucele kunlabori kun UEA en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn „

\* Rezolucio de Unesko - Montevideo, 1954

La sama Ĝenerala Konferenco elektis la Universalan Esperanto-Asociacion interparolanta membro de UNESCO kaj pro tio la delegito de la asocio povas partopreni la kunvenon de UNESCO kun interparolanta rajto.

Surbaze de tiu ĉi rezolucio vigla akceliĝo komencis sur la kampo de Esperanto. Komence de la pasinta jaro oni okupiĝis en lingvosciencia institucio de Scienca Akademio de Sovetunio pri la demando de Esperanto, pasintjare la 27-an de decembro direktoro de Bulgarlingva Institucio de la Bulgara Scienca Akademio, Vladimir Georgiev akademiano skribis leteron al la estraro de la Akademio, en kio li esprimis, ke laŭ konstato de la bulgaraj lingvistoj nuntempe Esperanto estas la sola artefarita internacia lingvo, kiu povis atingi bazitajn rezultojn. Li rimarkis ankaŭ tion, ke Esperanto estas facila lingvo, kiu estas ellernebla dum pli mallonga tempo, ol kiu ajn aliaj lingvoj kaj tiu estas la lingvo de la progresema homaro.

Efike de la grandsignifaj konstatoj nuntempe kaj en Sovetunio kaj en Bulgario kaj en aliaj popolaj demokratiaj landoj en ĉiuj lernejoj multe da homoj lernas la Esperantan lingvon kaj ne menciante la eksterlernejajn lingvokursojn. Post unu monato okazos en Moskvo la 6-a Mondjunulara Renkontiĝo, kiu en la historio de la renkontiĝoj unue deklaris Esperanton oficiala lingvo de la renkontiĝo, efike je la partopreno de esperantistoj dum la lasta varsovia renkontiĝo..

Ankaŭ la hungara esperantista movado ekfloris dum la du lastaj jaroj. En nia urbo estos la Nordhungaria Esperanto-Renkontiĝo la 13-14-an de julio, kie estos prezentata kun siaj aranĝoj ĉi tiu evoluo kaj niaj atingitaj sukcesoj.

La hungarlingvan artikolon de Ludoviko Király (el la tagĵurnalo „Északmagyarország” nro la 6 –an de junio 1957) esperantigis László Pásztor.



## ADA SIKORSKA




La 20-an de novembro 2006, ni mesaĝon ricevis de Francesco Amerio el Italio. En ĝi informis min pri la dek jara datreveno de morto de Ada Sikorska Fighiera kaj mencion faris pri ŝia interesa vivovojo. Je mia demando en mesaĝo la edzo - de la eksĉef-redaktorino de la HEROLDO : Ada Sikorska Fighiera - sinjoro Gian Carlo Fighiera permesis al ni publikigi taglibron de sia edzino, krome sian rememoron pri Ada, aŭ kiel li nomis Aduŝka.

(Francesco Amerio <[f.amerio@libero.it](mailto:f.amerio@libero.it)>)

(Giancarlo Fighiera <[giancarlo.fighiera@libero.it](mailto:giancarlo.fighiera@libero.it)>)

Bonvolu akcepti unue la taglibron de la 11 jara Ada Sikorska.





**Ada Sikorszka Fighiera**

**De tajgo al minaretoj**  
**El taglibro de 11 – jarulino**  
**ESPERANTOTUR**

**ENKONDUKO**

Ekde la momento de la eniro de la sovetaj taĉmentoj en Pollandon meze de septembro 1939, estis klare, ke ilia celo estis „engluti” la polajn orientajn terenojn. Por atingi tion, estis necese elimini la malamikan por ili polan elementon kaj anstataŭi per sovetaj civitanoj.

La unua amasa deportado, eble la plej terura, ĉar tute neatendita, okazis jam la 10. II. 1940: dum unu nokto oni forprenis tiam pli ol 220.000 homojn, precipe kamparanojn (tutajn familiojn kun infanoj). En la sama jaro, la 13. IV. similan sorton havis 320.000 kaj fine de junio pli ol 240.000 personoj. /Tie ĉi oni ne enkalkulas la polajn militkaptintojn de 1939 kaj enkarcerigitojn; la totala cifero estis preskaŭ 2 milionoj./ Aldoniĝas al tio ĉ.200.000 poloj devige forveturigitaj al Sovetunio en junio 1941. Elŝiritaj el siaj hejmoj – senkonsidere la aĝon, familiajn ligojn kaj sanstaton – ili estis kondamnitaj al perejo. Ĉiujn turmentis soifo kaj malsato, kaj depende de la sezono frostego aŭ varmego. Multaj ne travivis la plursemajnan vojaĝon en bestaj vagonoj.

La rusoj destinis al la deportitoj ĉefe kvar regionojn: la ĉirkaŭaĵojn de la Blanka Maro, terenojn antaŭ Uralo, ĉe Workuta, terenojn en la okcidenta Siberio kaj la stepojn de Kazahstano.

La sorto de ĉiuj estis simila: sklava laboro kun minimuma rekompenco kaj la „rajto” ricevi 400 gr. da nesufiĉe bakita nigra panaĉo...

La kondiĉoj inter la vivo en la nordo kaj la sudo estis sufiĉe diversaj, ne nur pro klimato. En la norda tajgo dense semitaj estis lagroj kun „speciale danĝeraj” polaj elementoj (kaj ne nur...) por Sovetio... Inter ili estis lokitaj „vilaĝoj” (setlejoj), konstruitaj grandparte de pli fruaj deportitoj el Ukrainio, Bjelorusio kaj Kazakio. Situitaj ĉe la riverbordoj, en la densa arbarego, ili „oferis” rifuĝon en simplaj lignaj barakoj kaj laboron ĉe la elhakado de arboj.

En Kazahstano la situacio estis malsama: tien oni venigis ĉefe la familiojn de polaj oficiroj, policinaoj k.s., do preskaŭ nur virinojn kaj infanojn. Ili estis dividitaj inter diversaj „kolĥozoj,” tre malriĉaj, ĉar la plej grandan parton de la rikoltoj forprenadis la ŝtato. La resto – dividita proporcie al la farita laboro, estis absolute ne sufiĉa por travivo.

Por la poloj – la deportado orienten ne estis io nova. Ni trovis en la malvarma nordo la postsignojn de niaj avoj, ekzilitaj al Siberio post la insurekcio de 1863 – 64 / Pollando de 1795 ĝis 1918 estis dispartigita inter tri tiamaj potencoj: Aŭstrujo, Prusujo kaj Rusujo./, kiuj siavice malkovradis tie la spurojn de la deportitoj post la pli frua insurekcio de 1830-31. Sed eĉ ili ne estis la unuaj. Tia estis nia orienta najbareco... pri tio en aliaj landoj oni tute ne havas ideon!...

La komenco de la germana – soveta milito, la 22-an de junio 1941, komplete ŝanĝis la situacion de la poloj en Sovetunio. La malsukcesoj ĉe la fronto devigis Sovetunion turni sin al la aliancanoj. Por la poloj la plej grava estis la „interkonsento Sikorski – Majski”. Fine de aŭgusto al la plej granda parto de la poloj alvenis novaĵo, ke la ĉefo de la Pola Registaro en Londono, gen. W. Sikorski faris la 30.07.1941 pakton kun la Soveta registaro, laŭ kiu ĝi „donis amnestion” al ĉiuj poloj.

Bedaŭrinde, el inter pli ol unu miliono, nur parto (ĉ. 116.000 personoj) sukcesis evakuiĝi al Irano (aprilo kaj aŭgusto 1942). En tiu kvanto troviĝis 45000 civiluloj. 3000 da ili (la aliaj estis alportitaj al Afriko, Hindio, Meksikio, Nov-Zelando k.s.), plej parte infanoj kaj junularo, trovis feliĉan rifuĝon en la ekzotika persa urbo Isfahano.. En tiu malnova, historia

kaj bela urbo, la infanoj klopodis retrovi la perditan infanecon, resaniĝis, fortiĝis kaj komencis regulan lernadon.

La taglibreto, kiun mi nun prezentas, ne pretendas esti historia priskribo de tiu periodo. Ĝi estas taglibreto de 11-jara knabino, kiu en leteroj al la amata onklino en Lvovo skribis pri tio, kion ŝiaj infanaj okuloj vidis kaj registris. La postaj partoj estis skribitaj jam en Isfahano kaj Libano.

Mi ne ŝanĝis la tekstojn, nek poluris la stilon. Por ke diversaj faktoj estu kompreneblaj, mi aldonis kelkajn notojn.

### **Bibliografio:**

„Isfahano, la urbo de polaj infanoj” eld. Rondo de la gelernantoj de polaj lernejoj en Isfahano kaj Libano, II-a eld. Londono 1988.

## **LA MILITO**

La 1-an de septembro 1939 la hitlera Germanio atakis Pollandon. Fine de aŭgusto mia pli juna fratino Marysia kaj mi estis ĉe nia iama vartistino apud Varsovio. La gepatroj, avino kaj mia pli aĝa fratino Krysia – malsana, restis en Varsovio.

**1. IX. 1939** – Ekstere tagiĝas. Tra la apenaŭ fermitaj eksteraj fenestroj eniras taglumo. La mondo vekiĝas. Subite la silenton rompas malproksima eksplodo. Poste la dua, tria...deka...kun angoro ĉiuj eliras kaj demandas unu la alian : „Ĉu la germanoj komencis la militon?” Bedaŭrinde jes. Dume la pafoj kaj eksplodoj ripetadis ĉiam pli ofte, la bomboj komencis faladi pli proksime. La suno, kvazaŭ pro ĉagreno, sin kaŝis malantaŭ la nuboj.

Ĉirkaŭ tagmezo alvenis la Panjo kaj Paĉjo, por preni nin al Varsovio. En la ĉefurbo regis granda maltrankvilo kaj teruro, la germanaj aviadiloj ĉiam pli ofte bombardadis. Ĉiujn 15 min. la fabrikaj sirenoj anoncadis la aviadil-alarmon.

**5. IX. 1939** – La sano de Krysia, kuŝanta en hospitalo, daŭre malboniĝadis; la gepatroj decidis revenigi ŝin hejmen: ĉiukaze, preskaŭ ĉiuj kuracistoj jam estis ĉe la fronto, do ne havis sencon lasi ŝin en la hospitalo.

Kiam mi rigardis al ŝia pala vizaĝo, ŝajnis al mi , ke la morto staras jam ĉe la pordo. Nur ŝi estis trankvila, kiam la domo tremis pro eksplodoj kaj ŝi trankviligadis nin ĉiujn. Ĉiuj sentis, ke en Varsovio neniuj povos savi ŝin, ke ni devas forvojaĝi.

La Paĉjo decidis konduki nin al Lvovo, sud – orienten de la lando, kie cetere loĝis la tuta familio de ambaŭ gepatroj.

**7. IX. 1939** – La Paĉjo aĉetis 2 aŭtomobilojn (mercedesoj) : en unua estis farita lito por Krysia, kun ŝi veturis la Panjo kaj Julia (nia helpantino). En la pli granda veturilo trovis lokon la Avinjo, ni du, Paĉjo, liaj du amikoj kaj nia hundo „Żabcia” (Raneto) . Posttagmeze ni ekveturis. En la urbo jam bone videbliĝis la sekvoj de la bombardadoj, la milita teruro montriĝadis de ĉiuj flankoj...ruinoj, kadavroj. Ekster la urbo, sur aŭtovojo, kun arbaroj ĉe la flankoj, ŝajnis pli trankvile...Tamen amasego da homoj kuris en ĉiujn direktojn, en paniko fuĝante de la germanoj. Nur ĉar la Paĉjo surhavis sian generalan unuformon kaj mia fratino kuŝis malsana, oni lasis nin veturi plue. Kadavroj de homoj kaj ĉevaloj, renversitaj ĉaroj, brulantaj domoj – jen rezulto de la intensa bombardado. Ĉirkaŭis nin mallumo, kiam ni eniris la arbaron – ja oni ne rajtis uzi lumojn, por ne provoki la germanojn. Post noktomezo ni haltis: la ŝoforoj dormis ekstere, ni en aŭtomobiloj. Estis jam sufiĉe malvarme nokte.

Sekvamatene ni daŭrigis, apenaŭ la suno leviĝis. Dum kelkaj horoj ni veturis tra la bela pola tero, ankoraŭ ne tuŝita de milito. Tagmeze ni haltis en Krasnystaw ĉe la fratoj Dominikanoj, denove bombatako, feliĉe ne tro longdaŭra. Dum tiu halto mia fratino tiel malbone jam fartis, ke nur subita injekcio revenigis ŝin al la vivo.

**9. IX. 1939** – Je la 5-a matene ni forveturas, rapidante al Lvovo, pro malbona farto de Krysia. Finfine aperas konturoj de la urbo. Ĉe la polikliniko oni ne akceptas ŝin. Sed jen denova bombardado, ni travivas ĝin en iu foso, la gepatroj restas ĉe Krysia kaj aŭtomobiloj. Ni daŭrigas al „Zielone” (Verda), eksterurba, malnova domo de la patra familio, kie ni du fratinoj restas kun la onklino Lunia (la fratino de Paĉjo); la aliaj veturas al ŝia loĝejo en la urbo (Tarnowskiego 30). Oh, denove bombardado, la tuta domo tremas kaj ni ĉiuj kun ĝi! Sekvatage la Paĉjo prenis nin, por instalii ĉe la onklo Adamo (la frato de Panjo). Ni ambaŭ preferis resti tie, ĉar ĉe la onklo Adamo estis nia gekuzoj, preskaŭ samaĝaj, Adaŝ kaj Tereska. Panjo kun Krysia ekloĝis apude, en malgranda memstara ĉambro (iam loĝis tie iu solulo, kiu malaperis). Dume Paĉjo ne revenis al Varsovio por defendi ĝin – kiel li planis – ĉar generalo WŁ. Sosnkowski nomumis lin gvidanto pri la defendo de Lvovo. Krysia ĉiam fartis pli malbone, eĉ ne havis forton leviĝi. La kuracistoj perdis ĉiun esperon savi ŝin, ĉar oni nur nun, tro malfrue, diagnozis malsanon: ne estis speco de tifo, kion oni supozis antaŭe, sed terura hinda malsano de brutaro brucelosa. La rimed-kuracilo por tiu malofta malsano troviĝis nur...en Germanio...

Iun nokton, la Panjo vekigis kaj vidis Krysia sidantan sur la lito, kvazaŭ ŝi volus leviĝi. Je la demando, kion ŝi faras, ŝi respondis: „Mi devas, iri al la Vistulo, por veturi per motorboato; mi ricevis ordonon de supre...”. Panjo trankviligis ŝin, ke matene ili kune iros tien. Ŝi jam sciis, kion tio signifas...

**13. IX. 1939** – Sekvatage alvenis la Paĉjo kaj diris, ke anonciĝas grandega bombardado kaj konsilis, ke ni translokiĝu al la unua etaĝo, en la bibliotekon de la fratoj Dominikanoj, kie estos pli sekure (kontraŭ grenadoj, almenaŭ). La geonkloj ja loĝis je la 3-a etaĝo. Post matenmanĝo ni komencis translokiĝadi. Je la fino la onklo Adam portis Krynjon, jam treege malfortan. Ŝi ĉirkaŭbrakis lin kaj kisis. Kaj tio estis ŝia lasta tera kiso, ĉar post kelkaj minutoj ŝi mortis. Ni ĉiuj ploris kiel malgrandaj infanoj. Mi sidis kun vizaĝo kovrita per manoj kaj ne povis trankviliĝi. Kiam la sirenoj anoncis la finon de la atako, oni vokis pastron. Post mallonga preĝado, oni prenis ŝian korpon kaj veturigis al la tombejo Łyczakowski, kie en la 6-loka surtera tombo de la familio Sikorski estis libera loko, tiu de la patro.

## EN LA RIFUĜEJO

La saman tagon ni transiris al la vera rifuĝejo, en la kelon de la monaĥejo. Kuŝlokojn oni aranĝis sur valizoj, nur la Avinjo havis feran liton. Vespere preskaŭ tuj post ĉies endormiĝo, teruraj eksplodoj vekis ĉiujn: faladis bomboj, grenadoj trafadis la dommurojn. Subite eksplodego skuis la tutan domon, ĉiuj pensis, ke la bombo trafis la monaĥejon...Estiĝis paniko, ĉiuj volis forkuri, sed la alvenintaj monaĥoj trankviligis nin, ke tio estis nur grenadoj. Ĉiuj revenis al siaj dormlokoj, sed mi ne plu povis dormi. La saman nokton alia grenado trafis la domon, sed neniu plu vekigis. Kiam heliĝis, mi iris rigardi la damaĝojn. Strange...eĉ ne unu peco trafis la figuron de la Dipatrino, en la fronta muro de la monaĥejo. Dum la tago ni purigis la korton, ĉar ĉie troviĝis rompitaĵoj de fenestroj, pecoj de grenadoj kaj alia „milita malpuraĵo”.

\*

Paĉjo vizitadis nin ĉiutage, alportate novaĵojn; ĉiun trian-kvaran tagon sendadis al ni farunon, sukeron, lardon, mielon ktp.

\*

Du tagojn post la entombigo de Krynjo, la gepatroj veturis al la tombejo por kontroli, ĉu ĉio estas en ordo. Reveninte ili rakontis teruraĵojn: la tuta tombejo estas multe damaĝita, el malfermitaj ĉerkoj elfalis freŝaj kaj malfreŝaj kadavroj, ĉio aspektis kiel batalejo.... Nia maŭzoleo restis, feliĉe, netuŝita. Panjo ornamis ĝin per ramoj de sorpo kaj eklumigis kandelojn.

## LVOVO OKUPITA!

**22. IX. 1939** – Tiun belan, sunan tagon la Paĉjo venis trista, kun terkolora vizaĝo kaj amare anoncis al ni: la sovetanoj okupis Lvovon! Tiuj vortoj falis kvazaŭ fulmotondro el hela ĉielo... Ne plu necesis resti en la rifuĝejo, do la saman tagon ni reiris ĉe la onklo, je la 3-a etaĝo.

\*

Mi komencis frekventi lernejon de la Nazaretaninoj. Post unu monato la sovetanoj malpermesis al ni preĝi, kaj tuj poste en la porknabinan lernejon devis eniri knaboj, kolektataj el la tuta urbo „batjaroj”.

\*

Intertempe, la sovetanoj, sub premo de la germanoj, prenis la polajn oficirojn en la militkaptejon; verdire mia Paĉjo mem sin anoncis al la sovetanoj opiniante, ke lia loko estas tie, kien iras liaj subuloj. Li povis forkuri al Rumanio, sed li tute ne volis tion fari. Krome la rusoj asertis, ke tio estas nur „honora militkaptejo” kaj donis „honoran vorton”, ke ili ne tuŝos la familion.

Jam unu semajnon la Paĉjo estas tie, dume ankoraŭ en Lvovo. Iun nokton, vekiginte, ni ekvidis lin dormantan apud Panjo. Nia ĝojo estis senlima, ĉar ni pensis, ke li jam revenis por ĉiam. Sed matene, je la 7-a, la ĝandarmoj denove venis por preni lin. La tagoj pasas... Ni loĝas nun ne plu ĉe la geonkloj, sed en apuda malgranda ĉambro. Vespero, tra la fenestroj oni povas vidi homajn siluetojn en mallumaj stratoj (elektron oni ankoraŭ ne havas). La Panjo preparas la liton, ni ambaŭ jam kuŝas. En la koridoro aŭdiĝas paŝoj kaj frapado ĉe la pordo. „Certe iu vizitanto” mi pensas kaj mia surprizo estas grandega, kiam en la malfermita pordo montriĝis ridetanta Paĉjo. Kun ĝojkrio ni ĵetis nin al li, ĉirkaŭbrakis, kisis. Oni vokis la Avinojn kaj kiam ŝi alvenis, komenciĝis rakontado. Oni lasis la Paĉjon je „honora vorto” ĝis mateno. Sed neniuj scias, kial – ili jam venis je noktomezo... Kelkajn tagojn poste, iu soldato alportis leteron, en kiu la Paĉjo skribis, ke ili ne plu estas en Lvovo, sed en Podwoloczyska, ĉe la landlimo kaj baldaŭ estos transportitaj en Rusujon. Poste leteroj alvenadis el „Lagro de NKVD” en Starobielsk, ĉe la Azova maro, kie troviĝis unu el la tri militkaptejoj de polaj oficiroj (11 generaloj kaj 7000 oficiroj), aliaj du estis en Kozielsk kaj Ostaszów. La leteroj alvenadis ĝis la fino de marto 1940 – poste ne plu...

**24. XII. 1939** – Hieraŭ vespere (ni tiam denove dum kelka tempo estis ĉe la geonkloj), kiam ni jam estis en la litoj, aŭdiĝis iuj frapoj, sed ni ne supozis, ke oni preparas kristnaskan arbon, ĉar ĉe ni, en Varsovio, oni faris tion la 24-an antaŭ vespero. Vekiginte hodiaŭ antaŭ tagiĝo je la 5-a mi vidis en alia ĉambro iu netan ombron. Finfine vekigis aliaj tri infanoj kaj tre delikate, sur la pintoj de la piedfingroj, ni alproksimiĝis al la „ombro”; nur tiam mi konstatis, ke ĝi estis granda kristnaska arbo, bele ornamita. Ni tamen ne sukcesis resti

trankvilaj, do poste ankaŭ la plenkreskuloj vekigis. Oni lumigis la kandelojn kaj disdonis donacojn: ĉiu el ni ricevis belan notlibron, dolĉaĵojn kaj fruktojn. Ni ne plu pensis pri dormo. Dum la tago ĉiuj helpis prepari antaŭfestan manĝon (vigilio) kaj kiam sur la ĉiela firmamento aperis la unua stelo, ĉiuj solene eksidis ĉe la tablo kaj ekmanĝis. Por fini, ni ĉiuj komencis kanti, je kvar voĉoj, kristnaskajn kantojn. Ni estis tristaj, ĉar mankis Paĉjo, sed ni kredis, ke la bona Dio aranĝos ĉion bone.

**9. III. 1940** – Mia nomtago. Post tagmanĝo, kune kun la Panjo kaj Manjo ni iris al la onklino Lunia (la fratino de la Paĉjo, nia plej amata onklino), kiu preparis dolĉan akcepton. Kakao kun ŝaŭmo (batita ovo – blanko), dolĉa hejmefarita bulko, bombonoj kaj kukoj. Ŝi havis „oran koron”: mem havante malmulte, ŝi ĉiam pensis pri aliaj. Nin ŝi ege amis, ni ja estis filinoj de ŝia ege amata frato...Mi ricevis donace belan libron kaj Manjo (ŝia nomtago estas la 25.III, sed oni prifestis kune) belan pupon.

Kelkajm tagojn poste, pro tro malgranda loĝejo, Panjo, Avinjo kaj Manjo translokiĝis al la kuzo de la panjo, nevo de Avino, kaj mi ekloĝis ĉe la onklino Lunia, pro la proksimeco de lernejo. Mi dormis sur malgranda sofo en unu ĉambro-angulo, en la alia staris komodo, kie mi havis miajn aferojn. Mi frekventis lernejon posttagmeze, do matene ni faris lernejajn taskojn, lavis, kudris gladis. De tempo al tempo venis la Panjo kun Manjo por viziti nin.

Tuj post tagmanĝo mi ris (kuris) kun miaj samklasaninoj el la ĉirkaŭaĵo, al lernejo, kiu daŭris ĝis la 18-a horo kaj 30 minutoj.

Post vespermanĝo kaj komuna preĝado, mi legis diversajn librojn, je kiuj plenis la onklina biblioteko (ŝi estis instruistino).

## OLIMPIADO

Por la fino de la lernojaro en nia lernejo estis organizita „olimpiado” (sed ne sporta), dum kiu i.a. mi kun mia koleginino Pola dancis oberkon (pola nacia danco). Post la prezentado, oni enmanigis al ni atestilojn kaj diplomojn el la ukraina lingvo „poŭvalna gramota”.

La somerajn feriojn mi pasigis kun la Panjo, Avinjo kaj Manjo, kiuj en la vilao havis unu ĉambro kun balkoneto. Multan tempon ni pasigadis ĉe la onklo Johano (alia patrina frato), kiu nemalproksime havis domon kun bela ĝardeno kaj kie, krom nia kuzeto Tadeo, venadis el la proksimeco aliaj geknaboj. Ni kuris, kaŝludis, aranĝis spektaklojn.

## DEPORTADO

**28. VI. 1940** – Reveninte el la urbo, ni eksciis de la onklino, ke venis tien ĉi NKVD (KGB) kaj demandis, ĉu ni loĝas tie kaj kie ni estas. Antaŭvidante ion malbonan, ni ne dormis hejme, sed ĉe la onklino Lunia. Sekvatage montriĝis, ke oni denove serĉis nin, kaj la onklino diris, ke ni ekskursas. La ĝandarmoj tiam ordonis, ke ŝi ripetu al ni, ke ni devas esti hejme venontan nokton. La Panjo tre nervoziĝis kaj decidis ne plu sin kaŝi: kio devas esti – estu. Efektive, la nokton de la 29/30.VI, je la 22-a horo (ni, infanoj, jam dormis) oni fortege frapis ĉe la pordo. Eniris 7 ĝandarmoj, junaj ukrainanoj. La Panjo kune kun ili iris al la policejo, klarigi, ke ni estas je la ŝarĝo de la onklo Adamo, muzikisto (kaj la sovetanoj multe aprezis la artistojn). Sed ili eĉ ne volis aŭdi pri tio, do post vanaj klopodoj, ĉirkaŭ noktomezo, revenis. Mi devas aldoni, ke ni estis bonŝancaj, ke ili ne ligis nian nomon kun la nomo de mia patro, ĉar la familioj de oficiroj, havis multe pli malbonan sorton.

Ŝi ordonis al la junuloj formeti la karabenojn kaj lasi ilin en angulo, dirante, kaj ja en la ĉambro estas nur 2 virinoj kaj 2 infanoj, kion ili obeeme plenumis. Poste eĉ helpis ligi per ŝnuro sakojn kaj fermi valizojn. Je la 4-a matene ni ĉiuj eniris ŝarĝaŭtomobilon. En la grizo de

frumateno videblas konturoj de la trapasataj domoj. Finfine ni alvenas al la stacidomo, kie oni „enpakas” nin en la best-vagonojn, normale destinitaj por porkoj, bovinoj k.s. Estis sufoke kaj malbonodoris. Ni grimpis al la breto. En ĉiu vagono estis ĉ. 30 personoj, po 7 – 8 personoj malsupre kaj supre, de ambaŭ flankoj. Grandparte estis hebreoj diversaĝaj, same kiel ni „rifugiintoj” el Varsovio kaj do, ne loĝantoj de Lvovo. Poste montriĝis, ke en la tuta transporto de 180 personoj, estis nur 5 familioj ne-judaj.

**1. VII. 1940.** – Ekstere fariĝas varmege, des pli ĉe ni, fermitaj, kun kvar malgrandaj fenestro-truoj supre. Tie estis moviĝo kaj ĉe ni silento. Ni havas, feliĉe, unu el la fenestretoj. Antaŭ vespero la trajno ekmoviĝis kaj komencis malrapide veturi tien-reen en la stacidomo. La Lvovanoj ĵetadis al ni panon kaj aliajn manĝaĵojn, sed ne ĉion eblis kapti. Fine vespere la trajno vere ekveturis kaj ni forlasis Lvovon kaj baldaŭ ankaŭ la polan teron.

En la vagono ni ĉiuj devis iomete aranĝiĝi – oni ja tute ne sciis, kiom da tempo ni devos resti en ĝi...Ni kvar havis por la tuta vojaĝo unu panon, ½ kg. da butero kaj 10 malmolajn ovojn. Sed ĉiuj solidare dividis ĉion kun ĉiuj kaj fakte ni vere ne malsatis. Kiel necesejo servis truo en la planko, meze de la vagono...Feliĉe iu havis grandan kurtenon kaj draton kaj helpe de tio oni faris „rondajn murojn”. Ja tio devis servi por 30 personoj dum tri semajnoj...

De tempo al tempo, kiam ni jam estis sufiĉe profunde en Sovetunio, oni permesis al ni foriri dum halto, kelkfoje ankaŭ – ĉefe nokte – oni donis al ni varman supon. Ĝenerale en la vagono estis varmege, sufoke kaj malpure – nenio miriga en tiaj kondiĉoj.

**19. VII. 1940.** – Finfine, post 19 pezaj tagoj la trajno vere haltis kaj ni povis eliri el la „malliberejo”. La saman nokton, iuspeca naveto veturigis nin ĝis Solviĉegodsk laŭ rivero. Dum nokto la vetero malboniĝis, komencis plui, sekve neniu povis dormi – la barko ne havis tegmenton. Matene, jam el Solviĉegodsk, ni daŭrigis per iu, kvazaŭ ludila trajneto mallarĝrela, sed kiam la reloj finiĝis, oni vojaĝis per sledoj (jes ja, estis somero, do anstataŭ neĝo servis tranĉitaj maldike ligneroj!...) Tiamaniere ni alvenis al „Zapadnyj Lesouĉastok” (Okcidenta Arbarpeco) – kelkaj barakoj en la arbaro. Lernejo je 12-km distanco, do ne atingebla.

Ni loĝas en lignaj barakoj, kiuj tute ne estas adaptitaj por la baldaŭa vintro, severa kaj frua en tiu ĉi mondoparto. En unu ĉambraĉo („komnata”), ĉ. 16 kvadratmetroj, ni loĝas 7-ope: ni kvar kaj 3 solaj viroj, kvazaŭ niaj „kuzoj”. Ili devas labori en la arbaro kaj danke al tio la Panjo ne devis iri tien. Estis du sufiĉe junaj fratoj, Hermano kaj Ignaco (tiu lasta lasis en Lodzo la edzinon) kaj Emilo, pli aĝa, devenanta el riĉa juda familio. La akvo troviĝas en rivero, 300 m. for, la komuna kuirformo ekstere, sur malgranda placo. Pri la manĝoj – sufiĉe terure: krom tre nigra pano ne sufiĉe bakita kaj elmanĝeja fiŝo-supon (kiun ni manĝas kun ŝtopitaj nazoj) ni havas nenion. De tempo al tempo iomete da lakto, tre multekosta. Terpomoj netroveblaj. Mia Panjo skribas al Lvovo: „Ni vivas ne kiel homoj kaj ni ne scias kiel ni povas elteni”. Mankis kaseroloj, mankis kiu ajn produkto.

Mi skribis en letero al la onklino Lunia: „mi estis kun unu ĉehino en la arbaro kaj kolektis ĉ. 6 glasojn da sovaĝaj framboj. Estis malfacile, ĉar la arbaregoj (tajgo) estas tre densaj kaj malsekaj. Tamen ni ĉiuj estis kontentaj: estis la solaj „vitaminoj”.

Pro la malproksimeco de lernejo, ni ne povis iri al ĝi, do ni helpis al la Panjo en la „mastrumado”. portis akvon el la rivero, helpis purigi la barakon ktp. Ni havis kelkajn gesamaĝulojn, sed nenion ludilon, pilkon, aŭ simile. Al mi plej multe mankis libroj por legi, ĉar ĝuste en la 10-a vivojaro mi fariĝis avida legantino.

Moskitoj, cimoj, blatoj kaj eĉ pedikoj vere manĝis nin, precipe dum la nokto, vera paradizo”! Ofte dum la nokto la plenkreskuloj aranĝas cimo-ĉasadon: sur la muroj, inter la lignotrunkoj ili estas en nekalkulebla kvanto!

Ni multe zorgopensas pri la Paĉjo, kie li estas, kiel fartas kaj kion faras?...

Kaj la semajnoj pasas...

Pro manko de vitaminoj ni komencas malsaniĝi, precipe ni infanoj. Krome estas diversaj strangaj insektoj, kiuj pikas. Unu verŝajne mordis mian fratinton je kruro: fariĝis granda absceso, ŝi havas febron – sed estas nenio por kuraci ŝin! Oficiala „kuracisto” laŭprofesie estas elektromuntisto kaj havas absolute nenion! Kaj la „dieta” – nigra pano kaj sensukera teo – tute ne adekvata por malsanaj infanoj. Feliĉe iu virino portis por ŝi ¼ glason da grio, alia ½ glason da maizfaruno (la homoj estas tre helpemaj!), kiuj por 2 tagoj povis solvi la problemon.

**7. IX. 1940.** – (El mia letero) „Da sovaĝaj bestoj mi vidis ankoraŭ neniun, sed ni ne povas eniri profunden en la arbaron, ĉar estas danĝera marĉo kaj oni povas ankaŭ perdiĝi. Nur viroj laborantaj en la arbaro (hakado de arboj), vidis postsignojn de lupoj, cervoj, ursoj. Tie ĉi mankas birdoj, eĉ simpla pasero ne estas. Stranga loko. Hieraŭ oni juĝis laborantojn, kiuj vendrede, pro grandega pluvo, ne iris al laboro, kaj la „estroj” nomas tion striko. Ili ricevis monpunon. La tagoj fariĝas ĉiam pli mallongaj, ofte pluvigas, ventas. Kun teruriĝo ni pensas pri vintro...

- daŭrigota-

### **La Formiko**

Ĉu vi konas laborulon,  
kiu semas neĝborulon?  
Oni povas scii tion,  
alte taksas ĝi socion,  
estingas per ŝpruc' fajreton,  
ne teksas por ĉaso reton.  
Ne estas tem' de Kroniko  
diligento de formiko.

Johano Kisspál – Mezökövesd

# **NORDHUNGARIA INFORMO**

Pásztor László H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Retpošto / E-Mail: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)

Weblap / Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>